

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 1 2018 Vendredon la 12an de januaro 66a jaro

Kalendaro

Ĉiuj vesperaj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

Lundon la 15an de januaro (semajno 3) *mandag*

Studkunveno. Ni pludiskutos malnetan tradukon de broŝuro pri malnovaj metioj.

Studemøte. Vi fortsetter å diskutere et utkast til oversettelse av en brosjyre om tradisjonelle håndverksyrker.

Mardon la 6an de februaro (semajno 6) *tirsdag*

Por novuloj: Por kio ni povas uzi Esperanton? (En Esperanto kaj la norvega laŭbezono.)

For nye interesserte: Hva kan esperanto brukes til? (På esperanto og norsk etter behov.)

Merkredon la 7an de februaro (semajno 6) *onsdag*

Ripeto de la hieraŭa kunveno (por tiuj kiuj ne povos veni mardon).

Reprise på gårtdagens møte (for dem som ikke kan tirsdag).

Lundon la 19an de februaro (semajno 8) *mandag*

Pritakso kaj plibonigo de la afiŝoj, faldfolioj kaj alia materialo por nia inform-budo.

Vurdering og forbedring av plakatene, flyvebladene og annet materiale for info-boden vår.

Mardon la 6an de marto (semajno 10) *tirsdag*

JARKUNVENO. Vidu p. 3.

ÅRSMØTE. Se s. 3.

Lundon la 19an de marto (semajno 12) *mandag*

Temo anoncota.

Tema kommer senere

Kaj ni anoncas **kromkunvenojn** kiam venas eksterlandaj gastoj.

OKAZIS

La rusa revolucio (7.11)

Centjara jubileo de la "oktobra" revolucio en Ruslando.

Asbjørn resumis la fonajn eventojn. Ni diskutis la sekvojn – unue favorajn, ekz-e abolo de analfabetismo, sed fine la plena stalinisma teroro – kaj ni komparis kun revolucioj en aliaj landoj. Fine ni legis freŝan intervjuon en la retejo liberafolio.org: *La revolucio donis nefinan venkon al Esperanto*, kaj manĝis ruĝan borĉon.

IJK en Afriko (21.11)

Anna Maria resumis finajn faktojn pri la Internacia Junulara Kongreso (IJK) kiu okazis por la unua fojo en Afriko (Togolando), kaj kiun ŝi helpis plani. Perskajpe raportis partopreninto pri la realigo. La temo estis "Viroj kaj virinoj en siaj

kulturoj". Pria diskuto malfacilis, ĉar laŭ afrika kulturo virinoj silentu en ĉeesto de viroj. Sed tio ŝanĝiĝis dum la kongreso.

Literatura kunveno (5.12).

Ĉeestantoj prezentis: *Pola Antologio* (1909), *Zamenhof* de Marjorie Boulton (1962), *Hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ* de Bernard Golden (1982) kaj *Poŝamiko* de edukado.net (2a eld., 2007).

Tradukado (18.12)

Ni daŭrigis nian tradukadon de "Malnovaj metioj".

2018 (2.1)

Perspektivoj por Esperanto en 2018? Se tiajn ĝi havu, ni devos reaktiviĝi alekstere: loka biblioteko, Vizaĝopaĝo ...

Jarkunveno / Årsmøte, mardon / tirsdag 6. marto

Tagordo / Dagsorden

1. Aprobado de la kunvoko
 2. Elekto de prezidanto de la kunveno kaj de protokolanto.
 3. Jarraporto (Ni antaŭsendos ĝin retpoŝte, kaj paperpoŝte al tiuj kiuj petos ĝin.)
 4. Jarkalkulo (same)
 5. Eventualaj ricevitaj proponoj*.
 6. Elekto de estraro**, revizoro kaj reprezentanto en la domo
1. Godkjennelse av innkallingen.
 2. Valg av møteleder og referent.
 3. Årsrapport (sendes ut som e-post. Papirutgaven sendes til de medlemmene som ber om den).
 4. Årsregnskap (sendes på samme måten)
 5. Eventuelle innkomne forslag*.
 6. Valg av styre**, revisor og representant i huskomiteen –

komisiono, ĉiuj kun anstataŭanto(j). Ankaŭ de nova elekta komisiono.

alle med vara – samt valgkomité.

* **Proponoj** atingu la estraron tri semajnojn antaŭ la jarkunveno *tre uker før årsmøtet*, do ĝis mardo la 13a de februaro (semajno 7).

(Por proponoj de statutŝanĝoj la limdato estis la 10a de januaro.)

**Mankas anstataŭantoj por la revizoro kaj la domkomisiono.

Pepita de Caspary (1932 – 2017)

Pepita de Caspary, naskita Criach, forpasis la 12an de decembro en Asker. Ŝi naskiĝis en Hispanio (Katalunio) dum la tempo de la hispana respubliko. Ŝiaj gepatroj estis respublikanoj kaj do apartenis al la flanko, kiu malvenkis la hispanan internan militon.

Estante infano, Pepita ekhavis poliomjeliton, kaj eble pro tio ŝi iĝis en kreskanta grado movhandikapita por la resto de la vivo. La gepatroj opiniis, ke ŝi tamen povos iĝi utila civitanino, kaj ili zorgis, ke ŝi edukiĝis kiel artflikistino. Ili ankaŭ volis doni al ŝi vastan internacian horizonton, kaj al tio kontribuis Esperanto, kiu okupos gravan lokon en la vivo de Pepita.

En la Universala Kongreso en Haarlem 1954 ŝi konatiĝis kun norvego, Herbert de Caspary. Ili komencis interkorespondi, kaj en 1956 Pepita transloĝiĝis al Asker, eklaboris en teksaĵfirmao kaj iom poste edziniĝis kun Herbert. Ili uzadis Esperanton kiel hejman

lingvon, kaj iliaj du infanoj, Tor Antonio kaj Stella, ekhavis kaj Esperanton kaj la norvegan kiel denaskajn lingvojn. Precipe kiam ili estis malgrandaj, Pepita kaj Herbert invitis norvegajn kaj alilandajn Esperanto-parolantojn al sia hejmo, por ke la infanoj spertu la praktikan uzon de Esperanto.

La engaĝiĝo de Pepita por Esperanto tamen ne limiĝis al la privata vivo. Jam en 1958 ŝi elektiĝis en la estraron de Klubo Esperantista en Oslo, kie ŝi, estante eksterlanda, "devigis" la ceterajn estraranojn uzi Esperanton kiel laborlingvon dum la estrarkunvenoj. Pepita estis prezidanto de la Oslo-klubo 1973 – 80, vicprezidanto 1988 – 92 kaj 1995 – 97, kaj estrarano aŭ anstataŭanto en pluraj periodoj. Se mankis kandidato por iu posteno, la solvo ofte estis demandi al Pepita, kaj ŝi akceptis, ĉiam helpopreta – kun unu escepto: kasisto ŝi ne volis esti! Sed preskaŭ ĉiujn aliajn postenojn ŝi iam havis.

Dum kelkaj jaroj ŝi ankaŭ stencilis

kaj multobligis la *Kluban Bultenon*. Ŝi havis postenojn ankaŭ en la estraro de Norvega Esperantista Ligo. En 1980 ŝi eĉ fondis lokan Esperantoklubon en Asker, *La Frakseno*. Ĝi vivis kelkajn jarojn, sed iom post iom konsideriĝis superflua, ĉar la membroj facile povis partopreni en la kunvenoj de la Oslo-klubo.

Malrekte, al Pepita grandparte ŝuldiĝas tio, ke NEL kaj Klubo Esperantista en Oslo (kun la tiama Eldonejo Esperanto) ekhavis propran ejon: Ŝia patrino donacis en 1981 konsiderindan sumon tiucele, kaj tio inspiris al monkolektado inter la membroj de NEL. La sumo kolektita ebligis aĉeton de la ejo en Olaf Schous vei 18 en Sinsen.

Pepita estis granda kontribuantino ankaŭ al la programoj de la klubkunveno. Ŝiaj kontribuoj ampleksas multajn temojn, de propraj travivaĵoj kaj vojaĝpriprikskriboj ĝis sociaj kaj kulturaj temoj. Konstanta programero ĉiu-aŭtuna estis, ke Pepita – kune kun alia klubanino Inger Richard (Grefsen en Oslo) – kunportis lastsomerajn produktojn el siaj ĝardenoj. Tiam la ĉeestantaro devis eltrovi, kiel ĉiuj

strangaj kreskaĵoj nomiĝas en Esperanto!

Kiam la movhandikapo de Pepita iĝis tiel granda, ke ŝi havigis al si radseĝon, ŝajnis al ŝi, ke donis al ŝi pli da libereco la "rulseĝo", kiel ŝi nomis la ilon, paŭsante la norvegan terminon. En unu klubkunveno ŝi entuziasme rakontis pri siaj spertoj en Beitostølen, centro de "san-sporto", do sporto adaptita ankaŭ al handikapitoj. Ŝi membriĝis en organizaĵoj de handikapitoj, kaj ankaŭ en pluraj aliaj organizaĵoj, i.a. la Civitan-klubo de Asker, la Ruĝa Kruco, kaj loka sekcio de asocio de dommastrinoj.

Entute Pepita estis homo vast-horizonta, grand-engaĝa kaj solidarema. Ĉe ĉiuj, kiuj havis kontakton kun ŝi, ŝi efikis kiel vitamin-injekcio. Ŝi estis societema kaj gaja, ŝi havis infektan ridon, mallonge, ŝi estis viglulino. Dum la lastaj jaroj ŝia malboniĝanta sanstato kaŭzis, ke ŝi ne plu povis esti tiel societema kaj komunikema, kiel ŝi dezirus. Sed ni havas abundon da helaj memoroj pri ŝi, kaj ilin ni konservos!

Otto Prytz

Alia versio aperos en *N.E-isto* – Red.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 5 aŭ 4 al Sinsen.
Vd. pli detale interrete ĉe esperanto.no/oslo => "vojklarigo".

* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper